



ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO-LIGO EN ISRAELO (ELI)

P.K. 39004, TEL-AVIVO

N-RO 62 - OKTOBRO 1977

האספרנטיסט הישראלי

בטאון הליגה לאספרנטו בישראל

ת.ד. 39004, תל-אביב.

חוברת 62 - אוקטובר 1977

העורך: אלכסנדר מנור



VOLAS KORESPONDI

T. Azuma, Midori 2-24-1, Utsunomiya 320, Japanio.
Pensiulo.

1. Evaresto Gil Pollares, Apartado 875, Barcelona, Hispanio.
2. Jordi Bros, Energia 7. 4° - 1-a, Barcelona-4, Hispanio.


Ambaŭ deziras korespondi je filatelaj celoĵ; interesas sin pri diverstemaĵ poŝtstampoĵ.

Sylvio Malheiros, Rua Araxá 40/202, Grajaú - zc 11, 20000 Rio De Janeiro, Brazilo. Ĵurnalisto kaj instruisto. 62-jara.

José B. M. Moraes, Rua 7 No 1466, Br - 13500, Rio Claro Sp., Brazilo. 15-jara mezlerneĵano.

Jaron Ilan, Siler 12, Jerusalemo, disponas je multaj korespondpetoĵ senditaj al li el diversaj landoĵ, grandparte de geĵunuloĵ. Tiu kiu deziras ricevi adres-ojn estas petata turni sin al li.

Ekzistas tutmonda klubo de personoĵ kiuj deziras korespondi per sonbendoĵ aŭ kasetoĵ: "The Voicespondence Club". Ĝi estas preta akcepti Esperantistoĵn. Interesatoĵ sin turnu al s-ano Daniel Luez, 1 Rue Victor Faglain, Laon, Francio.



ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO-LIGO
EN ISRAELO

P.K. 39004, Tel-Avivo
N-ro 62 - Oktobro 1977.

Ĉefredaktoro:
Aleksander Manor

Redaktoro:
Josef Ŝemer.

SALUTVORTOĴ AL LA UK

Jen la salutvortoĵ de Esperanto-Ligo en Israelo al la 62-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Reĵkjaviko, Islando, inter la 30-a de julio kaj la 6-a de aŭgusto, 1977. Ili estis legitaj dum la solena kongresa malfermo de s-ano Ĵak Isakov.


Estimata sinĵoro Prezidanto, estimataĵ kongresanoĵ. En la nomo de Esperanto-Ligo en Israelo mi salutas la 62-an Universalan Kongreson de Esperanto.

Israelo, la lando de la suno, salutas la kongreson kiu kunvenas en la tiel-nomata "lando de glacio". La ĉi-jara kongreso en Islando memorigas al ni ke ne nur la grandaj kaj potencaĵ ŝtatoĵ kontribuis al la evoluo de la homaro. Jen en ĉi-tiu malgranda lando fondiĵis parlamento multe pli frue ol en aliaĵ pli grandaj ŝtatoĵ, kio faris Islandon la pioniro de la demokratio. Kaj se la naudekjaran jubileon de la Internacia Lingvo ni solenas en Islando, tia simbola fakto demonstras ke kun la venko de la vera humana demokratio realiĵos ankaŭ la venko de Esperanto.

4.

Tia venko estas des pli necesa por la pli malgrandaj ŝtatoj, kiel Islando kaj Israelo, kies naciajn lingvojn minacadas tiuj de la pli grandaj ŝtatoj.

Ni deziru, do, sukceson al la 62-a tutmonda kongreso en la rapidigo de la fina venko de nia kara lingvo, Esperanto.



IMPRESOJ DE LA 62-A UNIVERSALA KONGRESO KAJ

LA OFICIALA ANTAŬKONGRESO

La Kongreso okazis ĉi-jare en la islanda ĉefurbo Rejkjaviko. La inaŭguro estis tre solena. Ĉeestis ĝin la prezidento de Islando, la loka urbestro, kiu bonvenigis la kongresanaron en Esperanto, kaj - kio estas grava atingajo por nia movado - la Ĝenerala Direktoro de Unesko, S-ro A. M'Bow.

S-ro M'Bow prelegis en la franca lingvo pri "La Rajto je Komunikado" (la ĉeftemo de la Kongreso), sed ĉiuj ĉeestantoj ricevis antaŭe la esp. tradukon, kio ebligis al ni sekvi la paroladon.

"Komunikado estas potenco," diris la direktoro de Unesko, "kaj tiel necesas forigi la malekvilibron en la informfluo inter diversaj kulturoj."

En la solena kongresa malfermo salutis la ĉeestantojn la reprezentantoj de trideko da Landaĵ Asocioj. Mi salutis en la nomo de Esperanto-Ligo en Israelo, kio sekvigis multajn aplaŭdojn.

La kongresa programo estis tre ampleksa. Mi mencias ĉi-tie nur kelkajn erojn kiujn mi ĉeestis: prelegoj de la prezidanto de UEA, D-ro H. Tonkin, kaj aliaj aktivuloj de la Movado; prelegoj enkadre de la Internacia Somera Universitato (ISU); progresiga kurso de Esperanto; Islanda Vespero; Internacia Arta Vespero; Teatra Vespero (pola); pupteatro; filmprezentoj; konversacia rondo por nespertaj parolantoj.

Mi partoprenis la tuttagan ekskurson al la Ora Cirklo en suda Islando kaj al akvoŝprucaj gejseroj, unu el la plej interesaj naturfenomenoj en la mondo.

La Kongreson ĉeestis ĉ. 1175 personoj el kvardek landoj. La nombro de la israelanoj estis naŭ. Kvin el ni partoprenis antaŭe la tritagan oficialan antaŭkongreson en Stirling, Skotlando. La partoprenantoj (ĉ. sepdek personoj) loĝis en unulitaj ĉambroj de la

5.

loka universitato. Tie okazis la programo, kiu estis dediĉata al la Esperanta kaj skota kulturoj. Prelegis la famaj esp. verkistoj M. Boulton, W. Auld kaj A. Goodheir. Okazis ankaŭ ekskursoj dum kiuj ni vizitis multajn kastelojn kaj preĝejojn. Ĉefe impresis min "National Wallace" Monumento, kie ni supreniris 246 ŝtupojn de la tre mallarga ŝtuparo de la turo. De ĝia supro ni vidis tre belegan verdan pejzaĝon, kio karakterizas la naturon en Skotlando. Krome okazis ankaŭ populara balo dum kiu oni instruis al ni (sukcese!) skotajn dancojn.

Menciindas unu interesa fakto: kompare kun Islando, ĉio en Stirling estis tre malmultekosta. Ekzemple: tranoktado ĉe privata hejmo en Stirling: tri usonaj dolaroj; en Rejkjaviko: dekok dolaroj...

Jak Isakov



EL LA BIBLIO

^v
Lau II Samuelo; I, 19 - 22

("הצבוי ישראל על במוחין חלל...")

La lindec' israela
Ve, pereis en montregiono!
Dum batalo kruela
Mortaj falis en lukt', militistoj.
Ne anoncu en Gato,
Nek en placoj de urb' Aŝkelono!
Por ne ĝoju sur strato
Pri venk', filinar' de filiŝtoj.
Ne plu rosoj, pro lukto,
Nek plu pluv' kovru monton Gilboa!
Por ke restu sen frukto
Ties kampoj kaj val' kun aleo;
Ĉar sur ĝi malhonoro
Misokazis al ŝildo heroa,
Al Saula reĝ-gloro,
Glor' de konsekritul' per oleo! ...



trad. J. Kohen-Cedek

Famaĵ Judaj EsperantistojALEKSANDR ZILBERNIK

Aleksandr Lejboviĉ Zilbernik nask. en 1831 en Viek-ŝniaj, distrikto de Vilno, Rusujo, kaj mortis la 25-an de Marto 1906 en Varsovio. Lia patro, Lejb Ŝah, estis libera rabeno en la juda komunumo. La familian nomon Zilbernik ricevis pro jena okazintaĵo: Por eviti militservon liaj gepatroj turnis sin al la seninfana paro Silberfenig kun peto, ke ili adoptu la infanon (Laŭ la rusaj leĝoj la sola filo en familio estis libera de militservo). La rusa oficisto enskribis la infanon Ŝah erare: anstataŭ Silberfenig li enskribis Silbernik. La infano lernis en Jeŝivot (superaj rabenaj lernejoj), kaj per meminstruado li lernis la rusan kaj germanan lingvojn. Li edziĝis kun la filino Hadasa de la riĉa kaj honesta familio Bjeloŝ en Bjelostok, Rusujo. Poste li translokiĝis en la urbon Kovno, kaj kune kun J. Ŝĉeranskij fondis fabrikon de ŝapo, kiun ili ambaŭ gvidis kvardek sep jarojn en plena harmonio.

Zilbernik havis kvar filojn kaj kvin filinojn. La plej juna filino, Klara (6 Okt. 1863 - 6 Dec. 1924), edzinigis la 9-an de Aŭgusto 1887 kun L. Zamenhof. Zamenhof finis la kreadon de Esperanto en 1885, kaj dum du jaroj vane serĉis eldoniston. Meniu volis aŭdi pri Esperanto, ĉar ekzistis jam la lingvo Volapük. Meniu volis riski eĉ malgrandan sumeton da mono por eldoni la unuajn broŝuretojn pri Esperanto en la rusa, pola, franca, germana, kaj angla lingvoj. Zilbernik donis 10 000 rublojn, kiujn Zamenhof elpezis por la presado de Esperantaj lernolibroj kaj ilia senpaga dissendo al lernejoj, profesoroj, kuracistoj, diversaj societoj, por multaj anoncoj en diversaj gazetoj. ktp. En 1888 al Marko Zamenhof, la patro de L. Zamenhof, minacis granda puno. Por eviti la punon L. Zamenhof donis al sia patro la restintajn 5000 rublojn, kaj li mem restis sen mono. Zamenhof savis la patron, sed ruinigis por ĉiam. La enspezoj de L. Zamenhof estis tiel malgrandaj ke ili kovradis nur parton de liaj plej necesaj kaj plej modestaj elspezoj.

A. Zilbernik subtenadis sian bofilon dum dekkvin jaroj. Li subtenadis lin ne nur materiale sed ankaŭ morale. Tuj post la apero de la Esperanto-libro (26 Julio 1887) li ellernis Esperanton perfekte, malgraŭ sia neĵuna aĝo. Li konsoladis ĉiam sian bofilon kiam la espero de tiu-ĉi lasta komencis malfortiĝi. Li havis ĉiam grandan amon por Esperanto. La libroj kiujn oni trovis sur lia tablo post lia morto estis Esperantaj.

A. Zilbernik estis la unua mecenato de Esperanto. Al Zilbernik esperantistoj multe ŝuldas, ke Esperanto aperis en la mondon, ke ĝi povis trapasi la plej malfacilajn jarojn de sia ekzisto. Sen A. Zilbernik Esperanto ne ekzistus en la mondo.

Adolf Holzhaus
Usono

LA BAHAI'A RELIGIO KAJ ESPERANTO

La bahai'a religio estis fondita en la dua duono de la 19-a jarcento per Bab ("Pordego") kaj Baha'u'llah ("Diogloro"). Ĝia elstara propagandisto estis Abdu'l-Baha ("Dioservanto"), la plej aĝa filo de Baha'u'llah.

La bahai'anoj postulas, interalie, la unuigon de la tuta homaro per ver-serĉado, la elradikigon de antaŭjuĝoj, la establon de plej alta internacia tribunalo, kaj - kio antaŭ ĉio interesas nin - la uzadon de internacia lingvo.

Pri la neceso de la internacia lingvo alparolis Abdu'l-Baha dum la bankedo de Esperantistoj en Parizo, en 1913. Li rakontis ke jam antaŭ ĉirkaŭ kvardek jaroj Baha'u'llah asertis, en siaj skribaĵoj, ke tiel longe kiel ne ekzistos internacia lingvo nebla estos la kununuigo de la tuta homaro. Jen kelkaj frapantaj fragmentoj de lia parolado:

"...Nuntempe la ĉefa kaŭzo de la malproksimo de popoloj kaj la kontrastoj inter la pensmanieroj de homoj estas la lingvodiferenco. La penso de la plejmulto de la homoj estas kiel enfermita en skatolo - sole la int. lingvo estas la konvena ŝlosilo por malfermi ĝin... La uzado de la internacia lingvo donos impulson al noblaj homaspiroj kaj kreos en la mondo komunan hejmon por ĉiuj..... Ĉiuj homoj havas la moralan devon esti dankemaj al D-ro Zamenhof por la internacia lingvo kaj glori lin pro lia nobla penado..."

D-ro J. E. Esslemont, kiu en sia libro interpretas la bahai'an religion, ĝian fundamenton kaj evoluon, esprimas esperon ke post nelonga tempo la internacia lingvo estu instruata en ĉiuj lernejoj de la mondo kaj ĝia uzado estu universala. Ni, Esperantistoj, akompanadas la bahai'anojn en ilia laboro kun niaj koraj bondeziroj.

Ing. Z. Dimant

MONDFAMAJ JUDAJ VERKISTOJNota de la Redakcio

D-ro Albert Goodheir estas unu el la elstaraj esperantaj verkistoj kaj redaktoro de la revuo "Esperanto en Skotlando".

Nun aperis lia grava verko, "Fondita sur Roko", la filozofio de Baruh Spinoza post tri jarcentoj.

Kun granda plezuro ni aperigas ĉi-tie lian artikolon pri Spinoza, kiun li afable sendis al ni kaj kiu entenas koncizan enhavon de lia tre valora verko.

ALBERT GOODHEIR

SPINOZA

Nederlanda poŝtmarko memorigas, ke antaŭ 300 jaroj mortis Baruh de Spinoza. En la lastaj cent jaroj li ricevis honoron, eĉ statuon, en sia naskiglando, sed tio ne forgesigas ke dum sia mallonga vivo (1632-1677) li renkontis malamom kaj miskomprenon. Dum jarcento post lia morto ne nur ortodoksuloj, judaj kaj kristanaj, abomenis lin, sed ankaŭ multaj kiuj konsideris sin progresemuloj, kiel Bayle, Voltaire kaj Hume. Kvankam neniu historio de filozofio estus komplete sen ĉapitro pri Spinoza, li neniam fondis skolon. Se li influis nian kulturon (kaj eble tiu influo nur komenciĝas), tio ne okazis dank' al la filozofoj, sed dank' al la poetoj, kiuj amis lin kaj lernis de li, jarcenton post lia morto. Ĉefo inter ili estas Goethe, kies "Faŭsto" enhavas multe da spinozismo.

Li estis modesta homo, kiu neniam verkis pri si mem. Nur per multe da peno biografoj eltrovis ion pri lia vivo. Li naskiĝis en Amsterdam kiel filo de judaj enmigrintoj el Portugalio, kiuj trovis liberecon por sia religio en la nederlanda respubliko. Lia patro estis komercisto. Baruh estis filo de lia dua edzino, kaj la patrino mortis kiam li estis kvarjara, verŝajne pro ftizo, kiel poste sia filo. Oni parolis la hispanan. La knabo estis nomata Baruh, sed ankaŭ Bento, kaj poste, latine, Benedictus ("benita"). En lernejo por knaboj sub la fama rabeno Mor-teira li lernis la hebrean kaj profunde studis la Legon kaj la komentojn de la hebreaj komentistoj. Roth montris ke la verkoj de Majmonido (Moŝe ben Majmon), kiu vivis sub toleremaj arabaj reĝoj en Kordo-

vo kaj Kairo (1136-1204), profunde influis lin, eĉ pli ol poste Kartezio (Descartes), la "patro" de moderna filozofio. Sendube Spinoza estis renoviganto, sed kun fortaj radikoj en la tradicio.

Post la morto de la patro, en 1654, la malortodoksaj opinioj de Spinoza komencis kauzi ofendon. Malgraŭ avertoj li ne volis silenti, kaj en 1656 la juda komunumo solene ekskomunikis lin. Laŭ lia biografo Lucas, li mem diris ke li havis la konsolon esti tiel senkulpa kiel la antikvaj judoj forpelitaj el Egiptio. La kondamno estis malaprobinda, sed almenaŭ komprenebla. La sinagogo timis ke iu el ĝiaj membroj, kiu proklamis tro liberajn opiniojn, eble provokos malamikecon de eksteruloj. Kvankam la urba registaro toleris la enmigrintojn, la ŝtata eklezio rigardis ilin kun suspekto. En la tiama Nederlando ekzistis pli da libereco ol en aliaj landoj, sed eĉ tie la toleremo havis limojn.

Restinte sola, Spinoza tamen trovis amikojn. Kelkaj el ili apartenis al la Kolegiantoj, sekto kun liberaj religiaj opinioj. En la domo de unu el ili, en la vilaĝo Rijnsburg, li loĝis dum du jaroj kaj tie komencis verki la "Etikon", sian ĉefverkon. Poste li transloĝiĝis al Hago. Antaŭ la domo, kie li loĝis kaj mortis, nun staras lia statuo.

Nia generacio malfacile komprenas la ofendon kiun kaŭzis la ideoj de Spinoza, kaj la fakton ke oni nomis lin ateisto, kvankam ĉiu povas legi en la "Etiko" ke la celo de lia filozofio estas la amo al Dio. Laŭ ortodoksaj kristanoj liaj verkoj estis forĝitaj en la infero kun la helpo de la diablo mem, kaj malortodoksuloj grandparte ne malpli abomenis lin. Estas rimarkinde, tamen, ke tiuj kiuj konis lin persone generale satis lin, eĉ kiam ili malakceptis liajn ideojn. Li korespondis kun homoj el diversaj klasoj kaj nacioj, kaj liaj leteroj montras lin fidela amiko.

Pri la bazo de sia filozofio li mem skribis, ke la tradiciaj filozofoj komencis per la sensoj, Kartezio per la menso, sed li per Dio. Tio signifas ke laŭ Spinoza certa scio estas scio pri la Tuto. Ĉio kio ekzistas estas unu substanco, kiun oni povas nomi Dio aŭ Naturo. Tiun substancan ni konas per ĝiaj du atributoj: penso kaj etendo. Alivorte, Spinoza estis nek ideisto nek materiisto. Menso kaj materio estas du aspektoj de la sama substanco. Ne ekzistas io arbitra. La leĝoj de Dio, kiuj estas la leĝoj de la Naturo, estas senesceptaj. Tio ne lasas lokon al mirakloj.

Ne ekzistas iu "libera", t.e. senkaŭza volo. Malbonan, do kontraŭhoman konduton kaŭzas ne malbona volo, sed konfuza scio (interese estas ke jam Sokrato opiniis same).

La homoj ĝenerale bazas sian sciön sur senplana sensa sperto. Tio estas la unua, au plej malalta, speco de scio, kiu povas erarigi. Spinoza nomas ĝin imagado. La homo tamen kapablas ordigi sian sciön kaj pripensi siajn spertojn, alivorte li havas la eblecon de racia scio, la dua speco. La fina kaj plej alta scio estas scio per intuicio. Tio eblas nur kiam homo liberigis sin de emocia sklaveco. Spinoza tamen ne proklamis, kiel la Stoikuloj, ke racio povas venki emociojn. Oni venkas emociön nur per pli forta emocio, kaj la emocio kiu ne dividas homojn, sed unuigas kun la Tuto, estas la amo al Dio. En nefinita libro li parolas pri la metodo rektigi la komprenon kaj pri ĝia celo: la scio pri la unueco de la menso kun la tuta Naturo.

La "Etiko" aperis post la morto de Spinoza, sed dum sia vivo li kaŭzis multe da ofendo per libro pri politiko kaj teologio. Laŭ li oni eraras imagante ke Dio havas homajn atributojn, ke ekzemple li estas kvazaŭ reĝo, leĝdonanto aŭ juĝisto. La homo mem devas racie ordigi la ŝtaton, kiu devas esti bazita sur toleremo, kaj ne bazita sur iu religia (hodiaŭ li sendube aldonus: aŭ politika) ideologio. Regantoj rajtas reguligi konduton, sed ne pensadon. Tiuj ideoj trovis favoron inter la nederlandaj komercistoj, la plej influhava klaso. Ili defendis toleremon, tiel ke Nederlando iĝis rifuĝejo de persekutitoj, kaj ili kontraŭstaris la maltoleremon de la kalvinista ŝtata eklezio. Tiu toleremo tamen ne estis sufiĉe forta por malhelpi, ke la verkoj de Spinoza, unu jaron post lia morto, estu malpermesitaj kiel "profanaj, ateistaj kaj blasfemaj".

Spinoza skribis pri Nederlando kiel "mia patrujo" kaj laŭdis ĝian liberecon. Pro la kondamno fare de la sinagogo neniu judo rajtis legi kion li verkis kaj eĉ alproksimiĝi al li je kvar jardoj. Li tamen restis judo kaj neniam aliĝis al iu sekto aŭ grupo. Li skribis ke eble iam la judoj denove starigos sian ŝtaton.

Spinoza donis racian bazon al la kredo pri la unueco de la homaro kaj de la universo ĝenerale. Lia doktrino montras la ĝustan vojon inter la danĝeroj de dogmatismo kaj skeptikismo. Lia kontraŭulo en la filozofio estis Hegel, kiu proklamas universon interne dividitan laŭ iu "dialektiko", kaj tial respondecas pri la perfortemaj politikaj ideologioj de nia jarcento, dekstraj kaj maldekstraj. Tiuj inter ni kiuj celas toleremon, raciecon kaj interkomprenon trovos ke Spinoza estas nia plej bona gvidanto.

ANKORAŬ VIVAS JUDOJ SUR LA TER!

A. Levi

Tri longajn jarojn tenas Rom' blokadon.
Kaj kvankam ne ekzistas jam esper'
Ĝismorte luktas homoj de Masada...
Ankoraŭ vivas judoj sur la ter'!

Kristanoj aŭtodafas en Toledo.
Posthoma cindro flugas en aer',
Sed gardas homoj la gepatran kredon...
Ankoraŭ vivas judoj sur la ter'!

Jen pogromulo kruda, li ne ŝercas.
En kor' - avido, en anim' - infer'.
Sed aŭdas mondo - jam parolas Hercl...
Ankoraŭ vivas judoj sur la ter'!

Jen kaŝe malamiko bestsimile
Alrampas la urbeton en koler',
Sed Trumpaldor jam ŝargas la fusilon...
Ankoraŭ vivas judoj sur la ter'!

Nazioj kreis koncentrejan reton
Kaj superplene fluas sangriver'.
Sed luktas brave varsovia getto...
Ankoraŭ vivas judoj sur la ter'!

Ĉu Babij Jar atestis plenpereon?
Ja unuvice luktis por liber'
Italo, franco, ruso, kaj hebreo...
Ankoraŭ vivas judoj sur la ter'!

Intencis Hitler fari "findecidon",
Por ni prepari vojon al infer'!
Sed flagras flag' kun stelo de Davido...
Ankoraŭ vivas judoj sur la ter'!

Bandit' kolektis aron da banditoj,
Frenezas kaj sovaĝas malesper',
Sed ĉiuj vetoj estos disbatitaj...
Ankoraŭ vivas judoj sur la ter'!



12.

Kruelaj teroristoj povas strebi
Al venko, al mortigo, al konker'.
Memoru ili - estis ja Entebe...
Ankorau vivas judoj sur la ter'!

Batale ni plenumas nian sorton.
Pri tio ni parolas kun fier':
Do estu nia Israel' senmorta!
Eterne vivu judoj sur la ter'!


Omage al la 29-a
Tago de Sendependeco

Esperantigis S. Mizeruha



Efrain Kison

LA KARUSELO



"Ricevi donacojn estas bone, fari donacojn estas pli bone", diras malnova juda proverbo, kiun mi memoras, kiam ni hejme ordigante cambron aŭ ŝrankon retroyas formetitan ajaron.

Ĉio estas nura afero de lerta kaj sperta organizado. Tial ekzemple ni konservadas ne-uzebajn donacojn cele al estonta re-utiligo en konvene instalita kesto kun multaj fakoj. Kiam ajn tia donaco alvenas - kaj tio okazas ofte - ĝi estas registrata, klasifikata, kaj metata en la koncernan fakon. Objektoj por suĉinfanoj automate migras en ekstran fakon, libroj pli grandformataj ol 20x25 cm estas formetataj en la "Bar-Micva"-sekcion, vazoj kaj arĝentanaĵoj en la geedziĝofakon, kaj aparte malbelegaj cindrujoj sub la rubrikon "nova loĝejo", ktp.

Iutage denove estas Purim, la festo de donacoj, kaj okazas jeno:

Sonoras ĉe la pordo. Ekstere staras Benciono Ziegler kun skatolo da pralinoj sub la brako. Li envenas kaj donas al ni okaze de l' Purim-festo la plenan skatolon. Ĝi estas pakumita per celofanaĵo, sub kiu troviĝas sur la skatolo svenige bela virgulino ĉirkaŭate de algegoriaj figuroj en teknikoloro. Ni estas kortuŝitaj, kaj Benciono Ziegler aprobe ridetis pri si mem.

13.

Ĝis tiu momento bone! Nian senrezervan bonvenon al la pralinoj, ĉar oni povas tian skatolon pludonaci. Ili taŭgas por multaj okazoj, por la sendependeca dat-reveno sambone kiel por geedziĝaj jubileo. Ni tuj metis la skatolon en la fakon "diversaj okazoj ktp."

Sed nia sorto evoluis alie: Subite ekfrapis min, la plej bonan edzinon el ĉiuj kaj min, nerezistebla mangodeziro pri ĉokolado, kiu povas esti plenumata sole de ĉokolado. Tremante pro avido ni forŝiris la celofanaĵon de la skatolo, kiun mi rapide malfermis. Sed ni tuj resaltis. La skatolo entenis kelkajn brumajn muskajn ŝtonetojn.

"Nesuperebla rekordo," mia edzino sensone konstatis. "Jen, la plej antikva ĉokolado kiun ni ĝis nun vidis."

Flamante de kolero ni jetiĝis sur la donacinton skuan ante lin tiel longe, ĝis li paliĝis kaj tremante konfesis, ke li antaŭ iom pli ol unu jaro ĝin donace ricevis de bona amiko. Kun tiu homo ni tuj telefonis, emfaze montrante al li lian respondecon. La bona amiko ekbalbutis: "Ska... ska... skatolon da pra.. ra..

ralinoj.. ho ve! Temas pri donaco de inĝeniero Glik pro ĝojo pri la israela venko ĉe la Sinajo-fronto.."

Ni plu-esploris. Inĝeniero Glik ricevis ĝin kvar jarojn pli frue de sia bofratino, kiam lia edzino naskis ĝemelojn. La bofratino siavice ankoraŭ tre bone sciis la nomon de l' donacinto kaj la jaron: Goldŝtajn, 1953. Goldŝtajn ricevis ĝin de Glazer, kaj Glazer de Ŝtajner - apenaŭ kredeble - de nia bonkora onklino Ilka, 1950. Mi tuj vidis klare: Siatempe onklino Ilka inaŭguris sian novan loĝejon. Kaj ĉar tiam en nia donacokesto la koncerna fako estis tute malplena, ni pezakore devis oferi tiun skatolon da pralinoj.

Subite kaj tute neatendite ni denove tenis tiun historian skatolon da pralinoj en niaj manoj. Sento de profunda respekto trafluis nin. Kiom do tiu skatolo da pralinoj travivis! Festojn de naskiĝtagoj, de venkoj, de domkonstrufinoj, pri nov-instalitaj loĝejoj, pro naskitaj ĝemeloj... fakte tiu skatolo da pralinoj skribis kompletan ĉapitron de nia historio.

Lau tio ni nun komunikas al la publiko ke la donaca skatolo da pralinoj de l' ŝtato Israelo ne plu ekzistas. Vole-nevole ni devos aĉeti novan.

Tradukis Gerhard Ziegler

F. R. G.

LA ETA SPRUCIGILO KIU IRIS KONTRAŬ LA KUTIMA FLUO

Ĉi-tio estas la rakonto pri Joram, la eta sprucigilo, kiu iris kontraŭ la kutima fluo. Joram loĝis en la granda parko en Ramat Gan kun multaj aliaj etaj sprucigiloj, kaj kune kun ili li akvumadis la parkon. Ĉiun tagon la ĝardenisto malfermis la centran kranon, kaj ĉiuj sprucigiloj komencis sin turni kaj ĵeti sian akvon en la aeron. Kia bela vidaĵo kiam ili ĉiuj turnis sin kaj ĵetis la akvon tiel malproksimen kiel ili povis!

Certe ni scias ĉiuj ke sprucigiloj turnas sin ĉiam de dekstro al maldekstro. Nu, unu tagon eniris en la menson de Joram nova kaj ekscita ideo. "Se mi nur povus min turni de maldekstro al dekstro mi povus kovri pli grandan areon per akvo. Sed kiel oni faru tion?"

La venontan tagon, ĝuste en la momento kiam li vidis ke la ĝardenisto komencas malfermi la kranon, li spiris profunde kaj tenis la spiron en si dum eta momento kaj poste donis al si fortan puŝon de maldekstro al dekstro. Kaj li sukcesis! Li komencis turni sin de maldekstro dekstren, dum la aliaj sprucigiloj daŭrigis sin turni en la kutima maniero, de dekstro maldekstren.

Tre rapide Joram fariĝis vaste konata. De ĉiuj partoj de la lando venis homoj por vidi la etan sprucigilon kiu iras kontraŭ la kutima fluo. Ĉiuj gazetoj en la lando verkis artikolojn pri li kaj eĉ fotografis lin.

Joram, kompreneble, tre ĝojis ke li estas tiel renomata. Sed la aliaj sprucigiloj en la parko ne estis kontentaj pri la gloro de Joram kaj ili mokis lin kaj diris malafablajn aferojn pri li. Ekzemple, ili diris ke Joram ne faris tion por helpi plibone la akvumadon de la gazono sed ĉar li volis esti vaste konata. Kaj Joram sentis sin trista, ĉar estis iom da vero en tio kion ili diris.

La instruistoj en la lernejoj interesigis pri Joram. La instruistoj de la elementaj klasoj alvenigadis siajn infanojn al la parko por montri al ili Joram, kaj ili diris al la infanoj, "Rigardu Joram. Li faras sian taskon diligente kaj lojale eĉ se li havas amikojn kiuj primokas lin."

Venis ankaŭ lernantoj de la mezlernejoj, kaj poste ili skribis verketojn pri Joram kaj diris, "Joram montras, ke se persono havas la kapablecon esti gvidanto en sia grupo, li devas fari kion li pensas esti prava kaj sendube li povos konvinki siajn grupanojn sekvi en siaj paŝoj."

Eĉ studentoj en la universitato venis vidi Joram. Unu el tiaj studentoj, post sia vizito ĉe Joram, diris al sia profesoro ke li volas verki eseon pri Joram kun la jena temo: Ĉiu persono en la mondo supozas ke li havas konscion kaj ke li havas liberan volon. Kaj Spinoza skribis ke, eĉ stono, se ĝi havas konscion, supozus, kiam oni ĵetas ĝin en la aeron, ke estas per sia propra libera volo ke ĝi flugas en la aero. Tiel same kun Joram. La profesoro neniam aŭdis pri tiu penso de Spinoza, kaj li kuntiris la brovojn. Kaj poste la studento decidis ke li ne volas skribi pri tiu temo.

Tiel la afero marŝis, ĝis unu tago en la aŭtuno, kiam frapis tragedio. Joram vidis ke la ĝardenisto alproksimigis al la kranon por malfermi la akvon, sed la ĝardenisto malfermis la akvon tre rapide, kaj Joram ne estis preta por li. Li ne havis la tempon preni profundan enspiron da aero. La akvo jam fluis, kaj li devis puŝi sin kontraŭ la fluo kun sia tuta forto. Li puŝis sin kaj puŝis sin, sed la akvo jam estis tro forta por li. Puŝante sin kun tia impeto Joram rompis ĉiujn risortojn k. radetojn en si. Li pendis senmove sur sia stangeto, kaj la akvo verŝis sin en malforta eta fluo ĉirkaŭ si. Kaj tiel li restas ĝis niaj tagoj.

Post tiu tragedio daŭrigis veni rigardi lin la lernejoj de la elementaj lernejoj. Iliaj instruistoj diris al ili, "La historio de Joram montras al ni ke oni ne devas montri sin antaŭ ĉiuj kaj fanfaroni, eĉ kiam oni faras aferon kiu estas bona."

La mezlernejaĵoj ankaŭ venis rigardi Joram, kaj ili skribis verketojn pri li kaj diris, "La vivo de Joram montras al ni ke kiam oni havas grupon kiu volas plenumi certan taskon oni devas labori en grupspirito kaj ne ke ĉiu kuru en alian direkton."

Ankaŭ studentoj en la universitato daŭrigis viziti la parkon por vidi Joram. Kaj generale ili verkis eseojn kun tia ideo: Tio kio okazis kun Joram montras al ni ke sociaj ŝanĝoj povas veni nur kiam la socio estas preta akcepti ilin. Kiam la socio ne estas preta por la ŝanĝoj, kiel okazis en la revolucioj de 1848 en Eŭropo, oni povas atingi nur fiaskon kaj amaron.

Robert Alberg

AL VENKO

Dum naŭdek jaroj
la obstinaj baroj
ankoraŭ ne dissaltis.

Batalantoj pacaĵ
dormemaj, lacaj
militojn eĉ ne haltis.

La strukturo
de la ĉina muro
pli kaj pli dikigās.

Nova sento,
facila vento
ne alproksimiĝas.

"Kurtene fera",
peza, severa
dividas la familian
rondon.

Nur defio
kaj envio
arigas la "trian mondon".

Ĉiuj trajtoj
de homaj rajtoj
estas sufokataj.

La sola frukto
de "UNO"-lukto-
la lingvoj parolataj.

En UNESKO
daŭra kresko
de babelaj turo.


Konsultaj rilatoj
de niaj delegitoj
kaj miljara muro.

Se nian revon
kaj la devon
ĉiam ni memores.

Se sincere
kaj kohere
de nun ni laboros

Ne letargie
sed energie
sur Zamenhofa fundamento

Ni rekaptos la relon
atingos la celon
ĝis fino de 1^a jarcento.



J. Giladi

Plibonigo de preseraro

En nia revuo n-ro. 61, sur p. 2, estis presita,
ke la unua Esperanto-libro aperis en junio 1887.
Bedaŭrinde anstataŭ la litero "l" estis presita la
litero "n". Devas do esti: julio 1887.

ANGULO DE JELI

TRAVIVAĴOJ DE LA ISRAELA JUNULARA DELEGACIO EN GERMANIO

Vendredon, 29-7-77, je 17.00, ekflugis aviadilo el
la la flughaveno "Ben Gurion" al Frankfurt. En ĝi sid-
is dektri israelaj gejunuloj, kiuj formis oficialan
Esperantistan delegacion. Mi estis unu el ili.

Ni surterigis en Frankfurt je 20.00. La germanaj
Esperantistoj (parto de ili) venis al la flughaveno kaj
akceptis nin ege bele kun ĉokoladoj. Ni veturis al
la naturamika domo "Waldheim", kie ni ricevis botelon
da "Esperanto"-vino. Poste, en la vespero, ni drinkis
ĝin kaj drinkis kaj drinkis kaj... parto de ni ebri-
ĝis (kaj mi partoprenis tiun-ĉi akĉparton) kaj faris
stultaĵojn.

Alia afero: unu el la germanoj demandis al ni kiu
volas noktnaĝi en lageto (eta lago) sed ni tute ne
komprenis kiel oni povas naĝi en la getto kaj ni sil-
entis; sed subite al ĉiuj klarigis la miskompreno kaj
ni ridis. Neniu krom ĉi-tiu germano naĝis ĉar estis
ege malvarme por ni, Israelanoj.

Alia memoro estas de la katedralo de Frankfurt.
Pluvegis kaj ni enkatedraligis, sed Amri staris en la
katedralo kun la ombrelo malfermita super la kapo.
Kiam oni demandis al li kial, li respondis ke li ege
timas ke Dio sendos fulmon kaj trafos lin!...

Bonmemoro estas la flosado sur la rivero Rhein,
kiu estis grandioza kaj tre ĝuiga. Ni ŝipveturis de
Mainz ĝis Bad-Honnef kaj la pejzaĝo estis belega.
Survoje estis pluraj stacioj, en kiuj ni ĉiam vidis
Bennon (una el la plaĉaj germanoj) mansalutante nin
per lia "Tembel"-ĉape. Unu de tiuj haltejoj estis
en Andernach, la ĝemela urbo de nia Dimona, kies flago
flirtis tie apud tiu de la loka urbeto.

En Bad-Honnef ni estis en ĝardenfesto kaj konati-
ĝis kun multaj homoj. Dum la ekskurso ni estis akcep-
titaj tre bele ĉe tri urbodomoj kie oni fotis nin kaj
skribis pri ni en la gazetoj.

En Paderborn ni vizitis en la centro de Esperanto
kaj vidis kiel oni instruas E-on per lumbildoj. Ni
ankaŭ ekkonis tie gejunulojn kiuj lernis Esperanton
dum tri jaroj en la lernejo sed tute ne scias paroli
Esperante (kaj mi, kiu veturis tuj post la fino de la
kvarmonata kurso, scias ege pli bone ol ili, kaj mi ne
estis diligenta lernantino, tute ne ... vi povas de-
mandi al D-ro Masler!)


Alia travivaĵo, ege plaĉa, estis de la Esperantista tendaro en Lohne kaj la vizito ĉe la marĉo ("dronu, dronu, kamaradoj..."). Ni veturis per bovinvagonoj, kaj estis tre interese. Tie ni ankaŭ adiaŭis niajn novajn (aŭ ne) geamikojn de Germanio, malgaje.

Poste ni veturis al Francio kaj ĉeestis la Kastelon Grésillon.

La Junulara Kongreso estis en Poitiers, kaj tie estis tre bone, bele, grandioze, ktp. Tie ni konatiĝis kun multaj interesaj kaj plaĉaj geesperantistoj kaj estis interese renkonti homojn el la tuta mondo kaj paroli kun ili sen problemoj.

Ĝis revido.

P.S. Tiu-ĉi vojaĝo estis belega, kaj se iu volas scii plimulte, li (aŭ ŝi, ĝi, ili, ktp.) povas demandi al ĉiu el la grupanoj kiu kunveturis.



Galit Vajs
(15-jara knabino)

NOVAJ TASKOJ ĈE JELI

JELI (Junulara Esperanto-Ligo Israela), enkadre de la lastatempa pliintensiginta agado, elektis plurajn novajn funkciojn por kelkaj el siaj membroj:

1. Gad Meir: Jam de duonjaro respondecas pri informado kaj kontaktoj kun la amas-komunikiloj.
2. Eldad Zaleman: Koresponda Servo kaj helpo al Regiona Agado de TEJO (Tutmonda Esp. Jun. Organizo) en la proksima oriento.
3. Oded Kleiner: Respondeculo pri fabrikaĵoj, presaj aĵoj, ktp.
4. Eti Kremer: Programistino de la Tel-Aviva Klubo, "Krokodilo".
5. Galit Weiss: Agado en mezlernejoj kaj kontaktoj kun junularaj organizoj.

LA 33-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

Francio, la 9-an de julio, '77. Kelkaj multloĝejoj studentaj domoj, ĉirkaŭataj de vastaj herbejoj. Apud la centra enirejo flirtis la verda Esp. flago... Jes, ni ja atingis la IJK-on de Esp. en Poitiers!

Post atendado en la informejo ĉiu povis ricevisian "kongresan ekipaĵon": bele pakitan teknon, identikedon havanta la nomon de la kongresan(in)o, kaj multajn presajojn cetere.

Kelkan tempon ĉiuj enlokiĝis, kaj tiam ni kontente ekrigardis la kongresejon kaj ĝiajn vivkondiĉojn. Ĉiu havis unulitan ĉambro. Malsupre troviĝis la trinkejo, kie ni estis havontaj estontece ege amuzajn vesperojn, kaj sociajn renkontigojn. Kelkaj ĉambroj estis pretigitaj je nia dispo: Libro-serva ĉambro, la informejo, monŝanga ĉambro kaj aliaj. Trans la neproksima strato troviĝis nia restoracio, pri kies kelnerino ni estis aŭdontaĵ "verkaĉon"...

La unua vespero komenciĝis per interbabilado, tutkora kantado, varma atmosfero - jes, vi bone divenis: ĝi estis la Interkona Vespero. La sekvintan tagon jam funkciis la Kongresa Gazeto - ĉiutaga duflanka informfolio. La kongresa agado ĉi-jare konsistis el ok laborgrupoj. Enkadre de tiuj-ĉi laborgrupoj, en kiujn ni disdividiĝis, oni informiĝis, interalie, pri la problemoj de la Esp.teatro, vizitis akvopurigejon en Poitiers, sciigis pri la situacio de la junularo en Israelo kaj Jugoslavio, kaj eĉ lernis kiel varbi junularon al Esp. ("Varbumo").

Plezura surprizo estis la kunvido de la spektaklo "La Justuloj" de Albert Camus. La franca esp. teatra grupo WESPA belege ludis la spektaklon Esperante, havante tre fortan francan akcenton....

La trian tagon prelegis Humphrey Tonkin, la prezidanto de UEA. Bela kaj samtempe ŝercema lingvo karakterizis lian prelegon. La surbendigantoj estis multaj kaj, kompreneble, la aplaŭdoj.....

Dum la Kabareda Vespero ni "gustumis" tre bonajn skeĉojn, ĝuis la programon de ĉiu popolo, kaj eĉ nia kvaropo kontribuis, kantante famajn hebreajn kantojn. Tre interesa konkurso premiis "La plej aĉan verkon de la jaro". Estos superflue aldoni ke ĉio tie estis aĉa - la plej alta premio el la tri aljuĝitaj estis eta bokalo de kukumoj. Indas rimarki ke unu el la premiitaj verkaĉoj estis skribita sur neceseja papero...


La kvinan tagon ĉiu havis grandan tuttagan eks-

kurson en la regiono Poitou. Ĝustrosto kaj drinkado de rugavino finis la aventuron. En la Literatura Vespero gajnis la unuan premion la libro "Ĉu vi kuiras ĉine?". Vi certe miras kial; do la respondo estas tre simpla: ĝi estas detektiva romano kaj ne gvidlibro por komencantaj kuiristoj!...

Konkurso pri la plej belaj gamboj (kruroj) estis aranĝita. Inter la kandidatoj ("memkompreneble", nur maskloj!) estis ankaŭ nia grupano, A. Wandel. Irante virinamane, havante perukon, rugigitajn lipojn, mamzonon kaj jupon, li gajnis la premion...

La kongreso finiĝis per simbola geedziĝo kiun havis nia e-ista israela paro, Mira kaj Avi. La mangajoj disdonitaj estis "falafloj" kaj "humus". La "freŝa" paro (kiu jam en Israelo geedziĝis) aspektis tre feliĉa. Venis ja la tempo ke ankaŭ Israelo povos fieri pri denaskaj e-istoj.

Post sep tagoj de interese kaj bele organizita kongreso, 350 junaj ge-esp-istoj, inkluzive la dek-sep israelajn, reiris hejmen al siaj dudekkvar landoj, ĝis la venonta IJK en Bulgario!



Eldad Zalcmán

Granda Atingaĵo Por La Israela Movado

Dum sia kunsido en la 33-a Internacia Junulara Kongreso okazinta en Poitiers, Francio, la Komitato de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), la junulara sekcio de UEA, elektis, i.a., nian aktivan junan samideanon Amri Wandel kiel estrarano de la Organizo pri varbado.

ELI kaj JELI kore gratulas lin kaj bondeziras al li sukceson en tiu-ĉi grava tasko por la antaŭenigo de la Esperanto-movado en la mondo.

Mi Funebras

BERNARD SVARZENSKI

La 27-an de aŭgusto forpasis en Herclia nia kara s-ano Bernard Svarzenski (1907 - 1977).

Maskita en Germanio, li esperantistigis jam en 1918. Tie li ankaŭ gvidis kursojn de Esperanto. Antaŭ la dua mondmilito li venis al nia lando. Ĉi-tie, en Herclia, krom la muziko, kiun li instruis profesie, li instruis Esperanton al grupoj kaj ĉe al unuopuloj, propagandante ĉiam la Internacian Lingvon.

Dum kelkaj jaroj li funkciis kiel peranto por UEA.

Li estis Dumviva Membre de UEA, membro de la Veterana Esperantista Klubo kaj Honora Membro de ELI. Ĉar dum la lastaj jaroj li estis preskaŭ blinda, li donacis por la biblioteko de nia Ligo ĉiuajn siajn esperantajn librojn.

S-ano Svarzenski sonbendis sur kvin kasetoj Esperanto-kurson por blinduloj kaj donacis ĝin al la blindula biblioteko en Metanja. Li tre bedaŭris ke li ne povas venadi al la klubejo en Tel Aviv kaj ĉiam interesis sin pri la aktivajoj de nia asocio kaj de ĉiu esperantisto aparte. Krom la jarkotizo, kiun li ĉiam pagis regule, li ofte donacis krompagojn al la kaso de ELI.

Lia forpaso estas grava perdo por nia Movado. Honoro al lia memoro.

J. Giladi

JOSEF WOHLBERG

J. Wohlberg mortis subite la 10-an de julio 1977 de koratako.

Li esperantistigis dum sia juneco en Rumanujo kaj estis tre aktiva kaj fervora Esperantisto. Post sia alveno al Israelo li estis membro de ELI, renkontigis kun eksterlandaj Esperantistoj kaj daŭrigis kun ili la skriban kontakton.

J. Wohlberg naskiĝis en la jaro 1907 en la urbo Ard en Rumanujo. Post kiam li finis la mezlernejon li studadis librotenanadon kaj laboris en Rumanujo kiel librotenisto.

Dum sia juneco li estis aktiva membro de la juna cionista organizo. Post la dua mondmilito li estis ĝenerala sekretario de la cionista organizo en Transilvanio.

En la komenco de la kvindekaj jaroj, kiam la aktiveco de la cionista organizo en Rumanujo estis malpermesita, li estis arestita (1952-3) kaj sidis en la malliberejo dum sep monatoj. Post la liberigo li estis arestita duan fojon en 1958. Nun li multe suferis. Li pasigis en la malliberejo unu jaron kaj kvar monatoj. Li estis severe torturita, malhonorigita kaj rompita korpe.

En 1962 li venis finfine al Israelo kaj komencis sian novan liberan vivon, dediĉante ĝin por sia popolo kaj patrolando. Kaj kiel fervora cionisto kaj Esperantisto li forpasis de inter ni.

Honoro al lia memoro.

A. M.

AVRI BARKAT

En aŭgusto forpasis en Eŭropo s-ano Avri Barkat el la kibuco Jasur. Ni aperigas ĉi-tie la kondolencleteron senditan al lia samkibucano de s-ano J. Tilleman.


Kara samideano Zeira,

Kun tre granda ĉagreno mi eksciis pri la forpaso de nia ŝatata smideano Avri (Avraham) Barkat.

Estas des pli bedaŭrinde ke tiu fatala frapo de la sorto trafis lin ĝuste enmeze de unu el la plej praktikaj efektivecoj se sia e-isteco - dum li vizitadis siajn samideanojn-korespondamikojn eksterlandajn en Eŭropo.

En la nomo de ELI kaj "Norda Grupo", kies membro li estis, mi sendas miajn plej sincerajn kondolencojn al vi, al liaj samfamilianoj kaj al la tuta kibuco Jasur.

Samideane vin salutas,
Jehoŝua Tilleman



EL NIA MOVADO KAJ AGADO

KLUBAJ VESPEROJ

- H. Maŝler - La problemo de la energio
- J. Ben-Alter - En batalo kontraŭ la krimo
- E. Haroun - Interparolado ELI-JELI
- A. Manor - El la esp. gazetaro
- J. Isakov - Raporto pri la Universala Kongreso (Islando)
- A. Vandel - Raporto pri la junulara delegacio al Germanio kaj la Int. Jun. Kongreso (Francio)
- A. Ron - La eduka rolo de Esperanto

"KROKODILO"



En Tel Aviv daŭre funkcias la porjunula rondo "Krokodilo". La kunvenoj okazas ĉiun duan merkredon en la Junulardomo. La celo de ĉi-tiu klubeto estas aktivigi la junajn s-anojn per interparolado, ludado, kantado, lingvoperfektigaj eroj ktp. Alia grava celo estas enmovadigi la lokajn kurslernantojn dum la daŭro de la kursoj kaj post ilia fino.

GRATULOJ

ELI kaj JELI gratulas kaj deziras multe da feliĉo kaj sukceso al ges-anoj Nira Frenkel kaj Avi Gal, okaze de ilia geedzigo. Ni memorigu al ĉiuj legantoj ke la juna paro interkonatiĝis unuafoje dum kunveno de JELI en Netanja. La mielmonaton ili ĝuis, i.a., en la Internacia Junulara Kongreso okazinta en Poitiers, Francio.

ELI gratulas s-anon J. Giladi okaze de la geedzigo de lia filo kaj deziras feliĉon kaj prosperon al la juna paro.



En la israela gazetaro

En la tre populara semajna magazino de la gazeto Jedit-Aharonot estis represitaj en septembro kelkaj ĉapitroj el la nova libro de Natan Jalin-Mor, "Ŝnot Beterem" ("Jaroj de Antaŭe").

En unu el ili rakontas la verkisto, fama gazetisto, ekspolitikisto kaj gvidanto de israelanda liberiga organizo LEHI, kiel li estis savita en 1939 dank' al Esperanto. Tiam, ĉe limurbeto inter Polujo kaj Rumanujo, lin liberigis el kaptiteco la "malamika" enketisto tuj post kiam evidentigis ke ili ambaŭ estas samideanoj.

Menciinde estas ke la esp. tradukon de tiu-ĉi historio publikigis Israela Esperantisto jam en septembro 1975 (No. 55).

En kelkaj israelaj ĵurnaloj (Maariv, Davar, Al Hamišmar) aperis sciigoj pri la delegacio de JELI al Germanio kaj la Int. Junulara Kongreso.

KURSOJ

* Kiel anoncote en la lasta numero de I.E., s-ano Aser Ron gvidas tutjaran kurson de Esperanto en la mezlernejo Kugel, Holon.

La lernantoj faros ankaŭ ekzamenojn kaj ricevos notojn. Ni deziras al s-ano Ron sukceson en tiu-ĉi grava tasko.

* En julio finiĝis en Tel Aviv la kursoj gviditaj de s-anoj Mašler kaj Murĵan.

En 26-10-77 komenciĝos novaj kursoj en la tel-aviva Junulardomo, gvidotaj de la samaj instruistoj.

* La koresponda kurso (p. k. 22041, T.A.) ĉiam daŭras. En ĝia gvidado partoprenas nun ses ges-anoj, plejparte JELI-anoj.

Ek de ĝia funkciigo en 1972 kaj ĝis 9/77 aliĝis (kaj pagis) al la koresponda kurso 380 personoj. El ili atingis la lastan lecionon kvardekkvin homoj, inter kiuj estas dekunu kibucanoj.

Menciindas ke inter la membroj de la junulara delegacio kiu veturis somere al Eŭropo estis ses finintoj de la koresponda kurso. (Sekreto: Ankau Amri Vandel esperantistigis pere de la K. K.....)

NOVAJ GESAMIDEANOJ

Finintoj de kursoj de D-ro Mašler, s-ano Murĵan, s-ano Zeevi, kaj la koresponda kurso:

Atar Iris, Azulaj Monik, Aleksandroni Moŝe, Aharoni Flora, Agrari Jarden, Admati Aŝer, Berkoviĉ Paŭla, Brandesdorfer Ada, Berlinerblau Reuven, Braunŝtajn Eliezer, Cajtlin Aharon, Didjo Ovadja, Imanuel Ŝoŝana, Forai Jehudit, Fridman Daniela, Forgas Meir, Grinberg Moŝe, Haĝbi Cijona, Hejt Jona, Hejt Solomon, Mademjan Josef, Krupnik Raĥel, Ken Eli, Kuŝnir Miĥal, Klajner Oded, Luboviĉ Orna, Mualem Ezra, Miĥer Orna, Melmant Aleksandra, Mecger Maja, Meŝulam Orit, Miŝor Orli, Popov Raĥel, Rov Cipi, Ŝtelman Tami, Sniatovski Boaz, Sidi Orli, Simŝa Jeni, Tirangel David, Tarcic Ĥaja, Vajs Galit, Vajnŝel Meira, Zolotariov Ziva, Kuŝnir Ĥava.

PRI ESPERANTO EN NIA RADIO

* En aŭgusto okazis en la stacio Galej-Cahal ("Armea Ondo") tre interesa tuthora intervjuo kun s-ano D-ro H. Mašler. La programo estis grandparte dediĉata al la personaj spertoj de la intervjuato rilate al la lingva problemo kaj al la Internacia Lingvo.

* En kelkminuta radioprogramo rakontis en septembro ges-anoj Mirjam Bakovcer kaj Gad Meir pri Esperanto kaj pri la junulara delegacio al Eŭropo. La dissendo ("Ondo B") inkludis ankaŭ esperantajn kantojn.

JARKOTIZO

Ni afable petas la membrojn kiuj ankoraŭ ne pagis la kotizon por 1977 al ELI/JELI (30IL) plenumi ilian samideanan devon. Koran antaŭdankon!

Atentu: Laŭ la decido de la Centra Komitato de ELI, la kotizo por 1978 estos 50 IL.

NOVA UEA - DELEGITO POR NETANJA

Pro la forpaso de s-ano J. Wohlberg, kiu estis ĝis la lasta tago la delegito de UEA en Netanja, la centra komitato de ELI decidis nomi kiel Delegiton por tiu-ci urbo s-inon Dvora Sor.

UEA havas nun en Israelo Delegitojn en la jenaj lokoj: Bat-Jam, Beer-Seva, Hajfa, Jerusalemo, Kirjat-Ata, Kirjat-Hajim, Kirjat-Tivon, Maabarot, Netanja, Ramat-Gan, Tel-Aviv, Tiberia.

NOVA PERANTO DE UEA

La oficon de UEA-peranto por Israelo ricevis la nova samideano Reuven Berlinerblau, Str. Añad - Haam 134, Tel Aviv, (tel. 233859).

Ni deziras al li sukcesan laboron!

Samtempe ni sendas niajn dankojn al la ĝisnuna peranto, s-ano Adrian Kuppermann.

DONACOJ

S-ano Thomas M. Goodman, Usono: 200 IL, al ELI.

S-ano Cvi Efrati, Tel Aviv: 150 IL, al Israela

Esperantisto

S-anino Natalja Habermann-Israeli, Givatajim:

100 IL, al JELI, okaze de datreveno de la forpaso de ŝia filo Rehavja.

Al ĉiuj tre koran dankon!

NIAJ EKSTERLANDAJ GASTOJ

Mladen Miroslajevic - Jugoslavio

Emmi Breuninger - Germanio

Ing. Skutaro - Rumanio

Arni Bødvarsson - Islando

Julia Sigmond - Rumanio

SOLVOJ

Solvoj de la enigmoj aperintaj en la lasta numero de nia revuo (No. 61).

Krucvortenigmo No. 1

VERTIKALE: 1. kurtag. 2. onkl. 3. tel. 4. or.
5. barbar. 6. ŝi 8. ruin. 10. strat. 12. UIM.
14. iu. 16. ek. 19. ELI. 21. ĉek. 22. te. 24. en.

HORIZONTALALE: 2. oktobr. 7. urn. 9. era. 10. si.
11. rukul. 13. rit. 15. tili. 16. ebur. 17. an.
18. meka. 20. aĉ. 23. rete. 25. reĝin.

Ni ricevis nur kvar solvojn, ĉiuj korektaj.
En la lotumo gajnis la premion (esp. libro)
Amri Vandel.

Demando pri la ĉasisto kaj la urso:

La felo de la urso estis blanka, ĉar la elirkaj reirpunkto povis esti nur la norda poluso.

Matematika Problemo

Atingis nin tri respondoj. La premion - esp. libro donacita de s-ano Natan Meller - gajnis Mananja Maroun.



ENHAVO

| | |
|---|-----|
| Salutoj al la UK | 3. |
| Impresoj de la 62-a UK - Ĵ. Isakov | 4. |
| El La Biblio - trad. J. Kohen-Cedek | 5. |
| <u>Famaĵ Judaĵ Esperantistoj</u> Aleksandr Zilbernik - A. Wolzhaus | 6. |
| La Bahai'a Religio kaj Esperanto - Z. Dimant | 7. |
| <u>Mondfamaĵ Judaĵ Verkistoj</u> Spinoza - A. Goodheir | 8. |
| Ankoraŭ Vivas Judoj Sur La Ter! A. Levi (trad. Ŝ. Miseruĥa) | 11. |
| La Karuselo - E. Kiĥon (trad. G. Ziegler) | 12. |
| La Eta Ŝprucigilo - R. Alberg | 14. |
| Al Venko - J. Giladi | 16. |
| <u>Angulo de JELI</u> Travivaĵoj de la Junulara Delegacio en Germanio - G. Vajs | 17. |
| La 33-a IJK - E. Zalcmán | 19. |
| <u>Ni Funebros</u> Bernard Svarzenski | 21. |
| Josef Wohlberg | 21. |
| Avri Barkat | 22. |
| <u>El Nia Movado Kaj Agado</u> | 23. |
| Solvoj De Enigmoj | 27. |